



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

IM SOZIALWERK DER DEUTSCHEN BUNDESBAHN

Numero 6 • Novembro/Decembro 1957

Preskaŭ cent gefideluloj

je la 1. renkontiĝo de la germanaj fervojistoj esperantistaj.

La sportuloj havas siajn konkurojn, la ŝakludantoj siajn turnirojn, la fotoamatoroj siajn ekspoziciojn kaj la stenografistoj siajn skribkonkurojn por montri kaj pravi siajn konon kaj progreson — kaj kion havas la esperantistoj inter la fervojistaro?

Ĉu ili entute povas prezenti sin publike, por montri siajn konojn? Mi estas tentata diri — nur malfacile, ĉar neniu neesperantisto komprenus nin, kaj por aferoj, kiujn oni ne komprenas, neniu volonte oferas sian liberan tempon. Filatelistojn allogi per ekspozicio de Esperanto-letermaterialo oni plejbonakaze sukcesus, sed tio ne konformas al la vera senco de Esperanto kiel lingvo por ĉiuj popoloj de la mondo.

Konkuri kiel esperantisto oni do nur povas, kiam renkontas esperantistoj unu la alian en libera konversacio. Tion celis ankaŭ la alvoko al la unua renkontiĝo de la germanaj esperantistaj fervojistoj en Fulda, je kiu kunvenis 94 gefideluloj la 12an—13an de oktobro.

„Bonvenon en Fulda“ salutis la surskribo sur ia nigra tabulo inter la enirejoj al la kajo kaj per la indiko „al la akceptejo“ oni sentis sin tuj hejmeca en esperantujo. Je ĉiu nove alveninta trajno oni aŭdis pli kaj pli bonkonatajn sonojn, ekkonis en la fluo de vojaĝintoj malnovajn amikojn kaj vidis novajn portantojn de la verda stelo, kiuj ne estas ĉiamaj gastoj de la internaciaj esperantokongresoj. Estis ĝojige, kiom estis atentintaj tiun unuan vokon al renkontiĝo.

Sabaton posttagmeze unue okazis la kunveno de ĉiuj partoprenintoj, en kiu estis komunikataj la zorgoj kaj malfacilaĵoj de la grupoj kaj lokaj rondoj, kaj estis pripensataj la decidoj pri ilia forigo. Ĉie montriĝis, ke eĉ ĉiu agnoskas la necesegon, lerni komunan helplingvon, sed nur malofte troviĝas personoj, kiuj vere serioze havas la volon, komenci je si mem. Ne logas tintantaj moneroj. Senlace, libervole kaj serioze ĉiun tagon lerni minimume duonan horon dum tuta jaro ne estas laŭ ĉies gusto kaj postulas fortan karakteron. Kiu obstine faradas tion, ne plu volas neuzi Esperanton.

Post komuna vespermanĝo en la stacia kantino oni aŭdigis per sonbendo eltranĉojn de paroladoj faritaj en la internacia Esperantokongreso en Marsejlo kaj montris la unuan Esperanto-sonfilmon — kreita de germanaj fervojistoj. Post tio ĉiuj ankoraŭfoje kunvenis en la kantino al amuza kunesto ĝis kantinfermo. Ĉiuj en vigla Esperanto-konversacio kaj ĉe gitarsonoj kun Esperanto-kantoj travivis ankoraŭ kelkajn gajajn horojn.

Dimanĉmatene la estraro kune kun la grupestroj havis pluan kunsidon en malgranda

rondo. Sekvis rondiro al la vidindaĵoj de la atestiminda barokurbo je la 11a ĝis la 13a horo. Komune manĝinte la partoprenintoj ekskursis per aŭtobusoj al kastelo Adolfseck. Jam la veturado tra la multkolora, brila, aŭtuna pejzaĝo dum belega sunbrilo estis por naturamikoj ĝuego, kaj al la belartamikoj prezentis la porcelan- kaj bildkolektaĵoj kiel la pompaj salonoj kaj saloneĝoj de la kastelo multe da vidindaĵoj.

Entute devas esti nomata la renkontiĝo plensukcesa. Ĉiu el la partoprenintoj hejmenveturis sentante, ke li travivis ion, kio ĝis nun mankis al ni esperantistoj kaj nur estis prezentata en kongresoj, nome la sinesploro, la ekzameno, kiom oni mem jam estas kapabla al libera konversacio kun aliaj esperantistoj kaj kiom oni krome ankoraŭ devas lerni. Ankaŭ ĉi-tie montriĝis, ke nia membraro eĉ estas malgranda, sed la lingva klereco tre pli boniĝis kaj la gefideluloj diligente laboris pri sia pliperfektiĝo esperantlingva.

Sekve de la ĝenerala deziro de la partoprenintoj ripeti tian renkontiĝon ĉiujare, la samideanoj nürnbergaj antaŭzorge invitis al la Dürer-urbo en 1958. Orefrapa aplaŭdo sekvis. Eĉ estus celinde, aranĝi distrikt-renkontiĝojn plurfoje po jaro. La en proksima estonto ankaŭ por ni fervojistoj atendata libera sabato kvazaŭ devigas nin, agi tiel.

Arĝenta strio je la horizonto por nia bona afero.

Steinig

Fast hundred Getreue

beim 1. Treffen der deutschen Eisenbahner-Esperantisten

Die Sportler haben ihre Wettkämpfe, die Schachspieler ihre Turniere, die Fotoamateure ihre Ausstellung und die Stenographen ihre Wettschreiben, um ihr Können und ihren Fortschritt zu zeigen und unter Beweis zu stellen — und was haben die Esperanto-Freunde unter den Eisenbahnern?

Können sie überhaupt vor der Öffentlichkeit auftreten, um ihre Leistungen zu zeigen? Ich möchte sagen — schwerlich, denn kein Nicht-Esperantist würde sie verstehen, und für Dinge, die man nicht versteht, will man nicht gern seine Freizeit opfern. Briefmarkensammler könnte bestenfalls noch eine Ausstellung von Esperanto-Briefmaterial anlocken, aber das entspricht nicht dem wahren Sinne von Esperanto als Sprache für alle Völker der Welt.

Wetteifern und sich messen kann man als Esperantist also nur, wenn man in freier Unterhaltung mit Esperantisten zusammentrifft.

Diesem Zwecke sollte der Aufruf zum ersten Treffen der deutschen Eisenbahner-Esperantisten in Fulda dienen, zu dem sich 94 Getreue am 12. und 13. Oktober einfanden.

„Bonvenon en Fulda“ grüßte die Aufschrift auf der Aushangtafel zwischen den Bahnsteigsperrern, und durch den Hinweis auf das „Akceptejo“ fühlte man sich sofort in „Esperantujo“ heimisch. Mit jedem neu einlaufenden Zuge hörte man zunehmend vertraute Laute, erkannte im Strome der Reisenden alte Freunde und sah neue Träger des grünen Sterns, die nicht zu den Stammgästen der internationalen Esperanto-Kongresse zählen. Erfreulich, wieviele diesem ersten Ruf zu einem „renkontiĝo“ gefolgt waren.

Am Nachmittag des Sonnabends war zunächst die große Zusammenkunft aller Teilnehmer, auf der die Sorgen und Nöte der Gruppen und Ortsstellen vorgetragen und Maßnahmen über ihre Abhilfe erwogen wurden. Überall zeigt sich, daß wohl jeder die Notwendigkeit, eine gemeinsame Hilfssprache zu lernen, anerkennt, aber nur selten sich einer findet, der wirklich ernsthaft bei sich anzufangen gewillt ist. Es winkt kein klingender Lohn. Wenigstens ein Jahr lang unermüdlich freiwillig täglich eine halbe Stunde zu lernen, erfordert eben schon einen ganzen Idealisten. Wer das erst schafft, wird Esperanto nicht mehr missen wollen. Nach gemeinsamem Abendbrot in der Bahnhofskantine wurden im Unterrichtsraum des Bahnhofs Ausschnitte von Reden beim Internationalen Esperanto-Kongreß in Marseille auf Tonband und der erste Esperanto-Tonfilm — der von deutschen Eisenbahnern gedreht ist — vorgeführt. Darauf fand man sich in

der Kantine zu geselligem Beisammensein nochmals bis zu Geschäftsschluß ein. Alle verlebten in angeregter Esperanto-Unterhaltung und bei Gitarrenspiel mit Esperanto-Gesang noch einige frohe Stunden.

Am Sonntagmorgen hielt der Vorstand mit den Gruppenleitern eine weitere Sitzung im engeren Kreise ab. Daran schloß sich um 11 Uhr eine Besichtigung der Sehenswürdigkeiten der ehrwürdigen Barockstadt bis 13 Uhr an. Nach gemeinsamer Mittagstafel trafen sich die Teilnehmer noch zu einem Ausflug per Omnibus nach dem Schloß Adolfschloß. Bei dem herrlichen Sonnenschein war schon die Anfahrt durch die bunte, leuchtende Herbstlandschaft ein Genuß für Naturfreunde, und für Kunstfreunde boten die Porzellan- und Bildersammlungen sowie die prunkvollen Räume des Schlosses viel Sehenswertes.

Das ganze Treffen muß als wohlgelungen anerkannt werden. Jeder der Teilnehmer nahm das Gefühl mit nach Hause, etwas erlebt zu haben, was uns Esperantisten bisher fehlte und nur bei Kongressen geboten wurde. Es ist die Selbstprüfung, das Erleben, wieweit man schon zu freier Unterhaltung in Esperanto mit anderen fähig ist und was man noch dazulernen muß. Auch hier zeigte sich, daß unsere Zahl zwar noch klein, der Bildungsstand sich aber sehr verbessert hat und die meisten eifrig an ihrer Vervollkommnung in Esperanto gearbeitet haben.

Dem allgemeinen Wunsche der Teilnehmer folgend, jährlich dieses Treffen zu wiederholen, luden die „gesamsideanoj“ aus Nürnberg vorsorglich für 1958 zum Treffen in der Dürerstadt ein. Stürmischer Beifall zeigte die Zustimmung aller. Es wäre sogar anzustreben, Bezirkstreffen mehrmals im Jahre zu veranstalten. Der in naher Zukunft auch uns Eisenbahnern winkende freie Samstag fordert geradezu dazu heraus.

Ein Silberstreifen am Horizont für unsere gute Sache.

Steinig

El la grupoj!

Weiden. Pri vigla grupa vivo raportas kol. König. Esperanto inter la fervojistaro trovis favoran akcepton tiel, ke ankaŭ la esperantistoj estas agnoskataj kaj subtenataj. 5 kolegoj vizitis la pasintan kongreson en Rijeka kaj 10 kol. intencas veturi al la venonta en Aarhus. La ĉiusemajnaj grupvesperoj estas bone frekventataj, eĉ de gefamilianoj. Oni lernas kaj kantas gajajn Esperanto-kantojn akompanate de akordeono. La perfektuloj renkontiĝas alterne en siaj hejmoj kaj ekzercas la liberan paroladon helpe de sonbendilo. Krome ekzistas forta korespondado kun eksterlandanoj. Prefere oni skribas „Eŭropa-cirkuligleteron“. La ricevinto ĉiam ŝanĝas la adreson kaj sendas la nove afrankitan leteron kun koraj salutoj al leteramiko en alia lando. Tiu agas sammaniere ĝis kiam estas plenskribita la koverto. La lasta ricevinto resendis la pompe per poŝtmarkoj diverslandaj ornamitajn leteron al la iniciinto. La grupo jam ricevis el Finnlando leteron, kiu travojaĝis 4 nordajn landojn.

Nova kurso komenciĝis en oktobro, kiun partoprenas 20 personoj. La progresintojn instruas sperta esperantisto, kiu nur antaŭ ne-longe fariĝis fervojisto kiel teknika dungisto. Tamen la grupo verve plupropagandas inter la fervojistoj spertinte, ke ekzistas ankoraŭ multaj fervojistoj nenion sciantaj pri la lingvo Esperanto.

Nürnberg. La monata grupa „bulteno“ anoncas por oktobro novan kurson por komencantoj. Ili kunvenas ĉiun mardon. Ĉiun duan vendredon renkontiĝas la grupanoj al libera konversacio. La Esperanto-biblioteko ricevis plurajn novajn librojn kaj la grupo abonis la UEA-gazeton „Esperanto“. Inter la grupanoj oni

aranĝis „konkurson“. La tre instiga temo tekstas: Ĉu la Germana Federacia Fervojo jam aplikas Esperanton praktike? Se jes, kie kaj al kiu koncerno? Kiun informon vi donus al la pasaĝero?

(Demando de la red.: Ĉu ne ĉiuj GEFA-anoj povus partopreni tian konkurson?)

Heidelberg. Novan kunvenĉambron ricevis nia grupo. Ĝis nun ĉiujauĉde la kunveno de la fervojistaj esperantistoj okazis kune kun la membroj de la grupo de Sogelo en la apuda ĉambro de la kantino ĉefstacidoma. Komprenoble pro la aliaj gastoj la grupvespero estis tre ĝenata kaj ne eblis, paroli tro laŭte. Per la afableco de la oficejestro en Heidelberg, BOR Fakiner, la esperantogrupo povas uzi nun la instruĉambron de la ĉefstacidomo. Estas grava progreso kaj la sukceso ne povis ne veni. Multe pli da esperantistoj kunvenas nun. Dum la grupvespero oni parolas, preparolas kaj ekzercas nur en Esperanto. Ĉiuj partoprenantoj jam antaŭgajas pri la venonta kunvenvespero.

rap. Winkelhaus

Karlsruhe. Dimanĉon la 27an de oktobro okazis en Schwetzingen la aŭtunkunveno de Sogelo. La nova prezidanto de Sogelo, nia subsekcioestro de la direkcia distrikto Karlsruhe, BOR Winkelhaus, povis saluti ankaŭ la prezidanton de GEA, s-ron doktoron Herrmann.

(Rim. d. l. red.: Estas ĝojige por ni fervojistoj, ke persono el niaj vicoj estras la Sud-Germanan Esperanto-Ligon.)

Chemnitz. El la nuna Karl-Marx-Stadt sendas korean dankleteron fervojista kolego por la de ni ricevitaj bultenoj. Ili estas por li la plej sopirata spirita nutraĵo, ĉar en lia urbo la cirkonstancoj ne estas favoraj al Esperanto. Tamen li esperas pliboniĝon estonte.

Trajno ekveturis

de Hans Riebau

Ute ne plu estimas min kaj tio okazis jene: Ni intencis vojaĝi, pakis la kofrojn, serĉis la biletojn, ŝiris la manitojn for de la hokoj kaj kuregis el la domo.

„Plirapidu!“ mi vokis, „la trajno ekveturos je la dekunua kaj tridek-kvin.“

„Je la dekunua kaj kvardek“, mia edzino kontraŭdiris.

„Je la dekunua kaj tridek-kvin“, mi ripetis.

„Kvardek.“ „Tridek-kvin.“ „Kvardek.“

„Sed Unjo“, mi vokis, „mi uzis tiun trajnon ĉiun semajnon dum tri jaroj. Ĝi ekveturas je tridek-kvin.“

„La horaro estas ŝanĝata ĉiujare“, spiregis Ute, „en tiu jaro la trajno ekveturas je kvardek.“

„Je tridek-kvin“, mi flustris kaj akcelis miajn paŝojn. „Mi precize scias, ke ĝi ekveturos je tridek-kvin.“

„Kvardek“, Ute rediris.

Kiam ni alvenis sur la kajo je la blanka ekveturtabulo estis legeble „11.35 horo“.

„Kiu nun pravas?“ mi kriis, „la trajno ekveturos je tridek-kvin.“

Mia edzino montris al la stacidoma horloĝo. „Jam estas tridek-ok“, ŝi diris, „do la trajno ne povas ekveturi je tridek-kvin.“

„Ĝi malfruiĝis“, mi ĝemis kaj ŝovis Uten en la kupeon. „Teorie ĝi ekveturos je tridek-kvin.“

„Ne temas pri teorio“, mia edzino respondis. „Praktike la trajno ekveturas je kvardek.“

„Ne“, mi kriis, „ĝi ekveturos nur hodiaŭ — escepte kaj pro teknikaj kaŭzoj — ne je tridek-kvin! Ĉar ĝi malfruiĝis! Sed tio ne kaŭzas, ke regule ĝi devas ekveturi je kvardek. Ĉu tio vere estas komprenebla tiel malfacile?“

En tiu momento okazis ekskuiĝo. La trajno ekveturis. Estis precize „la kvardeka“.

Ekde tiam Ute ne plu estimas min.

(Tradukita de E. Kruse)

Pri nia jubilea kongreso en Aarhus

enhavas la unuajn sciigojn la nova IFEF-bul-
tento n-ro 1/2. Krome estas aldonita la aliĝilo.
Ni regulos la aliĝmanieron kiel pasintjare kaj
raportos pri tio detale en nia venonta bulteno.

Ĝis tiam pripensu vian partoprenon. Rezervu
la tagojn inter la 10a kaj 16a de majo 1958 por
nia 10a kongreso. Ĝi fariĝu grandioza mani-
festacio.



... kaj pac' al homaro tutmonda

Al ĉiuj GEFA-membroj kaj Esperanto-amikoj ni deziras
gajajn, feliĉajn kaj pacajn festotagojn

je *Kristnasko*

LA ESTRARO

Atentu la novan limdaton por sendaĵoj al la redakcio. Estas ekde nun la unua de jan.,
marto, majo, julio, sept. kaj novembro. Raportu tuj pri ĉiuj grupaj okazintaĵoj.

Redakcio: Paul Steinig, Bremen, Ausbesserungswerk. Deĵoradreso: TBOI Steinig, AW Bremen,
Basa Bremen 835/348. Manuskriptojn bonvolu sendi skribitajn se eble per skribmaŝino unu kaj
duonliniajn al la redakcio, tradukajojn kun la originala teksto. Sendlimo por manuskriptoj
1. I., III., V., VII., IX., XI.

Preso: Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn